



Boriša Milićević:

ESPERANTO EN SERBIO EKDE 1892 ĜIS NUNTEMPO

KOMENCA PERIODO

La unuaj esperantistoj aperis en nia lando baldaŭ post publikigo de la unua lernolibro de internacia lingvo nomita Esperanto (en 1887).

En 1892 anoncis sin por Zamenhofa Adresaro: Svjatoslav Azdejkoviĉ el Brus, Dobrosav Kovaĉeviĉ el Ŝabac kaj Ĉ(edomilj) Marjanoviĉ el Paraĉin. Ili studis tiam en la Spirita Akademio en Kievo (Ukrainio) kaj tie trafis la lernolibron de Zamenhof. Svjatoslav Azdejkoviĉ forpasis en 1895, kaj D. Kovaĉeviĉ kaj Ĉ. Marjanoviĉ fariĝis instruistoj de katekismo kaj rusa lingvo en Beogrado propagandante la internacian lingvon Esperanton inter la kolegoj kaj lernantoj.

En 1901 aperis en la Adresaro la instruistoj el Srbska škola (Serba lernejo) en Beogrado:

Sreĉko P. Stevanoviĉ, Dimitr J. Stojanoviĉ, instruisto kaj K. J. Gliŝiĉ, prof.

En 1903 aperis en Vojvodino (kiu estis tiam en Aŭstrio-Hungario) prof. Tholt Pal kun sia edzino. Du jarojn poste kun li aperis esperantista grupo de lernantoj en Reala Gimnazio en Vrŝac.

En la Adresaro de Zamenhof el 1907 estis notitaj 8 esperantistoj el Beogrado.

Kompreneble, estis ankaŭ pluraj esperantistoj kies nomoj ne figuris en la Adresaro. Inter ili estis Inĝ. Dragomir M. Andonoviĉ, Beogrado, J. Nenadoviĉ, Beogrado, Paja Staniŝiĉ, Zemun, Jovan P. Jovanoviĉ, Krajujevac, Radomir Klajiĉ, Beogrado.

Esperanto-kursoj estis gvidataj en diversaj lokoj de Serbio kaj Vojvodino: Beogrado, Kragujevac, Zemun, Subotica, Petrovaradin, Titel, Pančevo, Novi Sad.

La esperantista grupo el 1908 en Beogrado transformiĝis en 1909 en la societon Druŝto srpskih esperantista – Serba Esperantista Societo, kiu ankoraŭ nun ekzistas (sub la nomo

Esperanto-societo „Radomir Klajić”). Ties unua prezidanto estis Inĝ. Dragomir M. Andonović kaj vicprezidanto – Radomir Klajić.

En 1910 kaj 1911 aperadis en Beogrado la dulingva gazeto Serba Esperantisto – Srpski esperantista. Ĝia redaktoro estis Dragomir M. Andonović.

En 1908 kaj 1910 aperis la unuaj Esperanto-lernolibroj en la serba lingvo, en Kragujevac de Jovan P. Jovanovic', kaj en Beogrado de Sinis'a Budjevac.

Bedaŭrinde, Balkanaj militoj kaj la Unua mondmilito malebligis esperantistan agadon.

Dum la Unua mondmilito pereis pluraj niaj esperantistoj, inter kiuj du tre aktivaj junaj esperantistoj – fratoj S(iniŝa) kaj Mihajlo Budjevac, la unua en 1916 kaj la alia en 1917.

INTER DU MONDMILITOJ

Post la I-a mondmilito ekestis Reĝlando de serboj, kroatoj kaj slovenoj (ekde 1929 Jugoslavio), kiun eniris Serbio (kun Vojvodino, kaj Kosovo kaj Metoh'io), Montenegro, Kroatio, Slovenio, Bosnio&Hercegovino kaj Makedonio.

En 1920, la II Kongreso de Socialista Laborista Partio de Jugoslavio (komunistoj) aprobis en Vukovar tre favoran Rezolucion al Esperanto. Tio instigis E-aktivadon en diversaj lokoj.

La geesperantistoj relative rapide kolektiĝantis kaj komencis fondi Esperanto-organizaĵojn je diversaj niveloj.

En Beograd refondiĝis en 1923 la societo Beograda Esperanto-societo; en Novi Sad ekestis du E-societoj – en 1922 kaj 1924, en Zemun en 1924, kaj poste en pluraj aliaj lokoj, kiel societoj, kluboj aŭ societ-fi-

lioj – Subotica, Veliki Bečkerek (poste Petrovgrad kaj nun Zrenjanin), Senta, Kraljevo...

Menciindas almenaŭ kelkaj elstaraj esperantistoj el tiu periodo:

Dragomir M. Andonović, Paja Stanišić, Radomir Klajić, Sreten M. Aĝić, Marko Nešić, Stevan Stojnić, Jakob Stefančić, Stevan Živanović, Agora Agorić, Branko Rajšić.

En 1923 okazis la unua tutlanda E-kongreso dum kiu estis fondita Ligo de esperantistaj societoj. Inter la du mondmilitoj okazis dekdu tutlandaj E-kongresoj (en Reĝlando de serboj, kroatoj kaj slovenoj, ekde 1929 Jugoslavio), el kiuj tri estis en Serbio – en Subotica (la kvara, 1931), Beogrado (la sesa, 1933) kaj Novi Sad (la 11-a, 1938).

Pluraj E-lernolibroj aperis en tiu periodo (de Siniŝa Budjevac – 1923, de A. Dj. Agorić – 1925, de Svetislav Petrović – 1926 kaj de Stevan Stojnić - 1936).

En 1933 kaj 1936 aperis Ŝlosilo de Esperanto de Stevan Živanović, kaj en 1934 Esperanta-serbokroata vortaro de Stevan Živanović.

Niaj esperantistoj kunlaboradis en la revuo La Suda Stelo kiu eka-peris en 1932 en Slavonski Brod.

Pro la progresemo, esperantistoj kaj esperantistaj organizaĵoj estis ĝenerale ĝenataj en

la laboro fare de ŝtataj organoj. Poste ekestis la malbena II-a mondmilito kaj Esperanto estis malpermesita. Bedaŭrindege, dum la naciliberiga milito pluraj geesperantistoj pereis.

POST LA II-A MONDMILITO

Post la liberiĝo fariĝis la federacia ŝtato – Jugoslavio. La Prezidanto de la Respubliko kaj la Aŭtoritatoj favoris Esperanton. La kondiĉoj por renovigo de E-agado estis favoraj kaj oni atingis diversflankajn rimarkindajn rezultojn.

Pluraj E-societoj restarigis siajn agadojn, kaj naskiĝis la novaj en diversaj lokoj de Serbio /Beogrado, Novi Sad, Subotica, Svetozarevo (nun Jagodina), Niš, Zaječar, Kraljevo, Zrenjanin k. a./.

Jam en 1945 ree ekagis Laborista Esperanto-societo, Novi Sad, kiu estis malpermesita de la Polico en 1940. Ĝi integriĝis en 1948 al la urba Esperanto-societo (ekde 1953 kin la nomo „Marko Nešić“).

En 1946 ekfunkciis Jugoslavia Esperanto-Federacio (JEF, poste JEL), Serbia Esperanto-Ligo (SEL) kaj 1954 – Vojvodina Esperanto-Ligo (VEL), kaj en 1955 – Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE).

En 1956 estis fondita Esperanto-Instituto de Serbio, kaj en 1960 anstataŭis ĝin Jugoslavia Esperanto-Instituto kiu funkciis ĝis la fino de la 60-aj jaroj kaj aperigadis la revuon „Kajeroj“. Ĝi reorganizigis kiel Instituto de SEL en sepdekaj jaroj, sed efektive funkciadas regule ekde 1984.

En Serbio okazadis multaj E-kursoj kaj seminarioj kaj konsiderinda nombro de esperantistoj sukcese faris A- kaj B- (kaj malpli ofte „C“) ekzamenojn.

Dum tiu ĉi tempo elstaris en la agado Branko Rajšić, D-ro Vuko Jovanović, D-ro Božidar Popović, Momčilo Šaponjić, Branko Maksimović, Tibor Sekelj, Antonije Sekelj kaj pluraj aliaj aktivuloj.

Dum tiu ĉi 60-jara periodo okazis en Serbio tri tutlandaj E-kongresoj: en Novi Sad – 1958; en Niš – 1970 kaj la lasta en Subotica – 1991.

La internacia kunlaboro estis konstante grava por nia E-Movado, kvankam ĝi estis konsiderinde reduktita dum la plurjaraj sankcioj kontraŭ Serbio en naŭdekaj jaroj.

En Serbio okazis kvin (5) internaciaj E-kongresoj:

SAT-kongresoj - la 29-a en Beogrado, 1956 kaj la 42-a en Novi Sad, 1969, kaj ree en Beogrado, 2006.

La 58-a UK de Esperanto, en Beogrado, 1973.

La 70-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, en Beogrado, 2004.

Krome okazis:

- La 5-a sesio de DESKF (Danuba Esperanta Scienca kaj Kultura Forumo), en Beogrado, 2001. Per siaj referaĵoj partoprenis 9 aŭtoroj esperantistoj el Serbio-Montenegro. Aperis la kolektilibro kun ĉiuj referaĵoj de DESKF-5.

- La 26-a Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj, en Mali Idoš, Vojvodino, 2004.

- La 6-a Balkanlanda Esperanto-Konferenco, en Niš, 2004.

Mgro Radojica Petrović estas prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Nedeljka Ložajić estas prezidantino de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE). Ĉe-instruistino Tereza Kapista restadis en diversaj landoj de Azio kaj Afriko (lastatempe en Burundio) por propagandi kaj instruadi Esperanton.

Boriša Milićević aktive kaj diversflanke kunlaboris kun E-societoj el Prilep (Makedonio), Kroatia E-organizaĵo, Rumania E-movado kaj la urba Esperanto-societo „La Mondo“ en Banja Luka, RS, BkH, kun kiu kunaktivis ankaŭ Mgro Radojica Petrović kaj Tereza Kapista. Dimitrije Janičić kunlaboris plurfoje en diversaj E-revuoj informe kaj literaturkampe.

E-societoj el Niš kunlaboras kun la esperantistaj organizaĵoj el Bulgario.

Pri ĉiuj rimarkindaj E-okazaĵoj en Serbio informadis interrete Dimitrije Janičić, Boriša Milićević, kaj sporade Zoran Ćirić, Marko Nikolić kaj Nedeljka Ložajić.

Tre rimarkinda estis la eldonaktivado. Aperis ĉe ni vere multaj informiloj, lernolibroj, vortaroj, beletraj kaj informaj verkoj, inter kiuj „Esperantistoj en Serbio“, Beogrado, 2006 (ĉefredaktoro D-ro Pribislav Marinković).

REVUOJ, GAZETOJ, BULTENOJ:

- La Suda Stelo, Beogrado (1947-1973); La Progreso, Beogrado (1954-1959); Jugoslavia Fervojisto, Beogrado (1956-2000); Esperanto (serblingve), Beogrado (1978-1983); Bulteno de VEL, Novi Sad (1966-1978); Bulteno de Esperanto-societo „Marko Nešić“, Novi Sad (1977-1990); VEL-o, Subotica (1983-1991); Bulteno de SEL, Beogrado (1989-1991); InfoSEL, Beogrado, Niš (1994-2000), la kvarmonata Beograda Verda Stelo (ekde 2006). Ĉefredaktoro D-ro Miodrag Stojanović, Elektronaj gazeto „Primara“ (ekde 2006. Ĉefredaktoro D-ro Pribislav Marinković).

- Informverkoj pri Esperanto de Dragan Dimitrijević, Božidar Popović, Ivan Andrejević, Gvozden Sredić, Radoslav Gajić, Zlatoje Martinov, Boriša Milićević.

- Lernolibroj de Božidar Popović, Antonije kaj Tibor Sekelj, Gvozden Sredić, Boriša Milićević, Živko Ivanović, Miodrag Kocić, Jovan Janković, Inđ. Ludoviko Sekereš (hungarlingve).

- Vortaroj de Stevan Živanović, Antonije Sekelj, Gvozden Sredić, Stevo Radjenović-Miodrag Kocić, Dimitrije Janičić (rete), Ivan Opačak-Pane Djukić, Boriša Milićević, D-ro Kalman Kovač k. a.

RIMARKINDAJ BELETRAJ VERKOJ:

- **La Montara Krono** de Petar Petrović Njegoš. Tradukis Svetislav S. Petrović. Cetinje, 1970.

- **Lirika Poemaro el Vojvodino (Serbio)**. Redaktis kaj plejparte tradukis Boriša Milićević. Novi Sad, 1983.

- **Mi esperas amon**. El poezio de la nealiancaj landoj (Afriko, Azio, Eŭropo). Redaktis kaj plejparte tradukis Boriša Milićević. Novi Sad, 1989.

- **Antologio de la serba parola literaturo**. Redaktis Živko Milojević. 6 tradukintoj. Beograd, 1991.

- **Svetu na dar**. Antologija srpske poezije za decu – Al la mondo donace. Antologio de la serba porinfana poezio. Redaktis kaj tradukis Zlatoje Martinov. Beograd, 1996. (Dum UK en Adelaide, 1997, ĝi estis proklamita kiel la plej bona porinfana libro de la jaro).

- **Antologio de la serba poezio (1200-2000)**. Redaktis Srđ Arandelović. Finaranĝis por aperigo Margarethe-Greta Stoll. Beograd, 1998. 25 tradukintoj, inter kiuj elstaris Margarethe-Greta Stoll.

- **Antologio de la serba skriba poezio**. Redaktis kaj tradukis Živko Ivanović. Beograd, 2002.

- **Miozoto**. Poemoj. 65 originalaj poemoj de Margarethe-Greta Stoll Arandelović, Beogrado, 2006.

Nuna organiza stato de nialanda E-movado

Bedaŭrinde, post la periodo de sankcioj kaj bombardado, nia E-movado estas malforte organizita. Pluraj E-societoj ĉesis ekzisti. La

ekzistantaj plejparte laboras konsiderinde fermite en si mem kaj tiel preskaŭ tute ne influas esence la neesperantistajn mediojn. Krome, nun mankas preskaŭ en ĉiuj niaj E-societoj spertaj geinstruantoj/istoj de Esperanto. Bontrafa, argumentita propagando de Esperanto plej ofte ne ekzistas. En Televizioj kaj tutlandaj gazetoj maloftas konvinkigaj informaj artikoloj. Niaj internaciaj E-funkciuloj ne kontribuas per agado samgrade ankaŭ al nialanda E-movado.

Multaj niaj geesperantistoj preskaŭ ne parolas aŭ malmulte konas Esperanton kaj ĝian movadon, kaj tiel ne povas prosperige agadi inter neesperantistoj. Multaj ne havas komputilojn. Laŭ mia scio, neniu nia, serblingva, lernolibro estas enkomputiligita. Sukcesigaj E-kursoj preskaŭ forestas aŭ malmultnombros. Cetere, en tia ĉi vivstata situacio, la junularo ne estas tiel facile alirema al Esperanto sen adekvata faktoplena informado.

Malmultas niaj oficialaj ligoj kun ŝtataj, sociaj, kulturaj organoj kaj institucioj. Ni preskaŭ ne informas ilin pri gravaj E-eventoj tra la mondo kaj sekve tiel ne povas atendi de ili ian oficialan subtenon.

ENDAS ORGANIZA REFORMO

Ni devas organize reformi fundamente nialandan E-movadon por povi sukcese partopreni la internacian E-movadon kaj kontribui plentrafe ke Esperanto estu pli multe aplikata kaj en niaj medioj kaj mondscale. Se tio ne disvolviĝas vastscale kune, Esperanto ne povas tutece plenumi la celon por kiu ĝi ekzistas.



Da li ste nabavili knjigu

ESPERANTISTOJ EN SERBIO

Ako niste, učinite to u toku kongresa. Za samo 300,00 dinara imate adresar svih esperantista u Srbiji i podatke o njihovim esperantskim aktivnostima.



Miodrag Stojanović:

ESPERANTO KAJ SCIENCO

Praktika aplikado de la internacia lingvo Esperanto ne estas tiel simpla, precipe dum la kongresoj kaj sciencaj konferencoj. Nome, diversaj sciencaj fontoj kaj negranda scienca literaturo en unuopaj laborkampoj trudadis la problemon de la lingvo. Jam komence de la 20-a jarcento unu el la plej grandaj filozofoj Ludwig Wittgenstein diris: *La limoj de mia lingvo difinas la limojn de mia mondo*. El tiu ĉi senco venas la konkludo ke en la scienco estas necesa unika lingvo. La unuajn meditojn pri la graveco de internacia lingvo en la scienco ni renkontis sub la egido de la Franca akademio de sciencoj, en unu komuniko titolita *Utileco de la internacia lingvo (Esperanto) por la scienco*. Sekvis, do, unu letero kun la subskriboj de akademianoj kiu Internacian ligan de akademioj avertas pri granda utileco kiun „la scienco povus havi de la enkonduko de internacia lingvo de d-ro Zamenhof“.

La manko de internacia lingvo faras grandan problemon en la sciencaj studoj kaj ĝiaj pli altaj atingiĝoj. Nome, tre granda signifo por la homara progreso estas rezultoj de kunlaboro inter mondaj scienculoj. En la serio de iliaj ofte ne tiom grandaj kontribuoj elkreskas grandgrajnaj sciencaj eltrovaĵoj. Per tio ni ofte prezentas la argumenton ke Esperanto povas trakti kaj esprimi ĉiujn aspektojn de la homa kulturo same bone kiel aliaj lingvoj.

Dum la unua jardeko de la pasinta jarcento, samtempe kun la konstituo de la internacia Esperanto-movado, inter scienculoj-esperantistoj oni sentis la bezonon de sia aparta organizaĵo. La unua tia kunsido de scienculoj-esperantistoj okazis dum la Dua monda kongreso de esperantistoj en Ĝenevo (1906). Tiam Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) mem estis fondita, restarigita en 1922, kaj denove en 1947. Oni tiam decidis labori je la disvastigo de la lingvo esperanto inter scienculoj kaj subteni la periodaĵon „Scienca Revuo“, ekmovitan la jaron 1903. Ĝi fariĝis oficiala organo de ISAE. La celo de apenaŭ fonditaj institucio kaj revuo estis, precipe, agado en la sciencaj medioj por esperanto kaj al la utilo de la ideo por enkonduko de Esperanto en la sciencon, same kiel pliriĉigo de esperantaj scienca kaj faka terminologioj.

Pli frue ol **Scienca Revuo**, en Esperanto aperadis kelkaj sciencaj periodaĵoj, el kiuj la plej menciindaj estas: Internacia Scienca Revuo (aperis, jam ek de 1904, 8 grandformataj volumoj kun multe pli ol 4.000 paĝoj) kaj *Bulteno de la Internacia Scienca Asocio Esperantista* ekde la jaro 1926 ĝis la Dua mondmilito.

Post la Unua mondmilito fariĝis rimarkebla fenomeno de pli granda disvastigo de esperanto inter sciencaj rondoj. La signifo de la lingvo esperanto por scienco aparte estis atestita en la serio de dokumentoj, unue en la Deklaracio de 40 membroj de la Franca akademio de sciencoj (1924), en ĝia konkludo ke Esperanto „estu grandutila por la progreso de la scienco kaj de ĝia apliko“. Subskribintoj de la Rezolucio esprimis la esperon por ke tiu ĉi lingvo - „majstra verko de logiko kaj simpleco“ – estos enkondukita en ĉiujn lernejojn de la mondo.

Intertempe sekvis la Manifesto de 85 japanaj sciencistoj (1950), laŭ kiu oni sin ŝuldigis ĉiujare publikigi almenaŭ unu sciencon disertaĵon esperantlingve kaj tradukadi esperanten ĉiun arti-

kolon publikigitan en iu alia lingvo. Ekirante de la penso ke „la scienco estas komuna insisto de homoj por fariĝi estaĵoj meritplenaj porti la nomon *homo sapiens*“, la subskribintoj akcentadas ke la enkonduko de Esperanto kiel unika lingvo en la sciencon interkompreniĝon estos tre efika rimedo kiu ebligas la solidarecon en internacia kunlaboro de scienculoj.

En la mesaĝo de Munkena konferenco de ISAE (1951) estas skribite: „Ni povas konstati, kreinte en tiu ĉi lingvo, ĝian plenplenan kapablecon (taugecon) por la esprimado de sciencaj pensoj... Ni opinias ke Esperanto, en la praktiko dum ĝia sesdekjara ekzisto, meritas seriozan aprobon flanke de la scienco“.

Similajn rezoluciojn eldonadis ankaŭ pluraj sciencaj kunvenoj de ISAE, same kiel kelkaj neesperantistaj organizaĵoj. Tamen, la plej grava estas Rezolucio de UNESCO (1954), kie oni montris rekonon de la rezultoj surkampe de intelekta interŝanĝo pere de Esperanto. En Kopenhago (1962) okazis la Unua internacia konferenco pri lingvaj problemoj en la scienco.

Kiam la sciencaj publikaĵoj estos presitaj en internacia lingvo je pli granda preskvanto, la rezultoj de la scienca laboro povus esti atingebblaj al la tuta homaro – opiniis nia elstara esperantisto kun la scienca profilo prof. d-ro Boža Popović, kiu dum jaroj estis respondeca redaktoro de „Scienca Revuo“, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista (jugoslavia filio). Samtempe, nia estimata d-ro Popović, naskita Niŝ-ano, skribis kaj publikigis en la sama revuo plurajn precipe sciencajn artikolojn. Inter ili ni mencias jenajn du: 1. **Lingva problemo en matematikaj kaj fizikaj sciencoj** (prelego en Internacia Somera Universitato, Kopenhago, 1962) kaj 2. samtempe faka kaj scienca priskribo ***Kia(j)n scienca(j)n revuo(j)n ni bezonas en Esperanto***. Celo de la artikolo kaj la esencaj demandoj estas: *Enhavo laŭ la sciencaj branĉoj, Enhavo*

laŭ la scienca nivelo, Ligiteco kun neesperantistaj scienculoj kaj Redaktado, administrado kaj financado.

Koncerne la enhavon de la revuo laŭ sciencaj branĉoj grava estas konkludo ke *nur unu scienca revuo neniel povas esti solvo de la problemo*, ĉar la scienco konstante dispartiĝas en pluraj sciencaj branĉoj. „La fakulon de difinita scienca branĉo interesas plejparte la artikoloj el lia (ŝia) branĉo, kaj nur duavice kaj supraĵe aliaj artikoloj. Pro tio estas memkomprenebla tendenco krei ankaŭ en Esperanto revuojn pri ĉiu fako aparte. Tiun tendencon kaj la procezon oni ne povas haltigi“, konkludas d-ro Popović.

La aŭtoro de tiuj ĉi alineoj havis grandajn pleziron kaj honoron publikigi du siajn prelegojn: 1. **La mezepoka serba eposa heroo Marko Kraljević en balkanlanda folkloro (Kongresa libro de la 58-a Universala Kongreso de Esperanto, Beograd, 1973, p. 53)** kaj 2. sub la titolo **Grekaj popolaj kantoj en la traduko serba** (Scienca Revuo, n-ro 28, 1977, 3-16), estis prelego en Internacia Somera Univesitato, Ateno, 1976.

Referaĵoj de DESKF-5 (BEOGRAD, 2001) je diversaj artikoloj perlaboris la temon **Danubo – rivero de kunlaboro**. „La Beograda DESKF-sesio havis ĝis nun plejnombrajn referaĵojn kaj...eblecon por unua fojo en la kurta DESKF-historio publikigi la prezentitajn verkojn libroforme“, kiel en *Antaŭparolo* diras prezidanto de Loka Organiza Komitato Zlatoje Martinov.

Inter pli ol tridek ĉeestantoj, plejparte serbaj (ne)esperantistoj, prelegis kelkaj gesamideanoj el Rumanio, Hungario kaj Italio. Nome, Renato Korseti parolis pri *La kokoj de renco aŭ „pri la neceso kunlabori en ĉirkaŭdanubaj landoj“*. El inter niaj aŭtoroj mi, vere subjektive, mencios nur kelkajn: *Prahistoria trovejo Vinĉa apud Danubo* (Dimitrije Janičić), „*Ribela ekkrio*“ kaj *aliaj poemoj de Rigas Feraios en pridanubaj manuskriptoj* (Miodrag Stojanović), *Esperanto-bibliografio en Jugoslavio* (Boriša Milićević)...

Intertempe, ISAE disvastigis la kampon de sia agado je fakoj kaj sekcioj. Krom la eldonado de la tradicia periodaĵo „Scienca Revuo“, aperis ankaŭ kelkaj fakaj periodaĵoj: „Medicina Revuo“, Internacia Pedagogia Revuo“, „Jura Revuo“ (la periodaĵo por la kompara kaj internacia juro).

De la jaro 1976. Internacia Federacio de sciencoj presadas la revuon „Mondo de scienco“, en kvar mondaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. La saman jaron, dum la kunsido de UNESCO, sciencistoj-esperantistoj dediĉis atenton al la normigo de scienca kaj teknika terminologioj. Pro tio en UEA laboras Terminologia Esperanto Centro (TEC), fondita en 1981, kiu zorgas pri esperantaj terminoj en diversaj medioj. Dekoj da fakaj terminaroj en esperanto aperis dum jaroj kaj multaj estas rete haveblaj (<http://esperanto.net/tec/>). La interreto estas potenca rimedo por la verkado kaj tradukado de sciencaj kaj teknikaj artikoloj en esperanto. „Unu kanalo kiun oni lastatempe multe uzas por tiu celo estas Vikipedio – multlingva libera reta enciklopedio. La esperanta Vikipedio (<http://eo.wikipedia.org/wiki>) kiu ekzistas de 2001, enhavas jam pli ol 40.000 artikolojn, kaj plurajn sciencajn kaj teknikajn artikolojn. Tre valora iniciato sur la tereno de retaj artikoloj estas la Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko ĉe la retejo de Eventoj (STEB, <http://www.eventoj.hu/steb/>). STEB klopodas kolekti kaj re-disponigi sciencajn kaj teknikajn artikolojn en tre diversaj fakoj de natursciencoj, juro, medicino, ekonomio kaj aliaj. STEB provizas kreskantan datumbazon de malnovaj kaj novaj artikoloj kaj fakaj terminaroj, kaj povas servi kiel kerno de scienca kaj teknika eldonadoj en esperanto“.

La fakto ke la lingvo povas esti taŭga por la scienca uzado, se ĝi havas riĉan fakan terminologion. Pro tio, dum la periodo 1904-1910, sub la patroneco de la periodaĵo „Scineca Revuo“ kaj ISAE, oni eldonis la unuajn fakajn periodaĵojn por scienca kaj teknika ter-

minologioj. Post la Dua mondmilito aperis vortaroj; la plej ampleksa estas konata „Plena ilustrita vortaro“, kiel la pruvo de ampleksa esperanto-leksikologio. Temas pri la plej grava disciplino de esperantologio kiu ankoraŭ ampleksas etimologion (vorthistorion), sciencon pri la deveno kaj origino de la vortoj. Aparta disciplino estas kompara esperantologio kiu studas la strukturon kaj la elementojn de esperanto kun tiuj de aliaj lingvoj artefaritaj kaj naturaj.

Malgraŭ konstantaj penoj por malkovri sciencajn vojojn al esperanto, restas pluraj problemoj kiujn oni apenaŭ devas solvi. La ĉefa malfacilaĵo al pli rapida penetrado de esperanto en la sciencon estas manko de esperantaj sciencaj libroj. Kompreneble, ĉar tiujn librojn kreas kaj publikigas precipe scienculoj esperantistoj, vere por montri kiom Esperanto estas aplikebla en la scineco. Nome, por instigi la flegadon de la scienca penso en Esperanto kaj sen ia ajn lingva bariero samnivele kaj egale utiligi ĝin al homoj en ĉiuj partoj de la tuta mondo. Pro tio ni esperas ke tiu ĉi nia historia kaj faka trarigardo de ĝisnunaj esperantistaj sciencaj paŝoj montras atingitan nivelon je tiu kampo. Tamen, restas konkludo ke ĉiuj esperantistoj, sendepende ĉu ili estas aŭ ne estas scienculoj, siaflanke povas kontribui al pliriĉigo kaj disvastigo de sciencaj rezultoj.

Literaturo

1. L. L. Zamenhof, *Lingvaj respondoj*. Unua parto. *Leksikologio*, p. 1-41. Francujo 1962.
2. Luis Bastien, *Naŭlingva etimologia leksikono*. Anglujo 1950.
3. Dr Pavle Mitrović, *Teorija međunarodnog jezika*. Sarajevo 1957.
4. Radoslav Gajić, *Živi jezik*. Gradina, 1980.
5. *Danubo – rivero de kunlaboro*. Referaĵoj de DESKF-5. Beograd, 2001.



Dimitrije Janičić:

ESPERANTA GAZETARO

Ĉi tiu teksto enhavas ĉiujn informojn pri Esperanta gazetaro kaj eblecoj de kontaktoj kun ili. Se iu el niaj societoj kaj urboj deziras havi sian gazeton, ĉi-teksto povus esti helpo por komenco.

Esperanta gazetaro ne estis ofte temo de analizo. Ekzistas libro **Periodaĵoj en 1993–1994**, kaj tekstoj de finnlanda esploristo kaj fakulo pri informado Juka Pietilainen el la Universitato de Tampere, en *La Ondo de Esperanto* (numero 150, 152), kiu donis al ni mallongan analizon pri Esperanta gazetaro. Malmultnombraj esploristoj kaj esperantistoj faris detalan analizon de gazetaro. En ĉi tiu teksto ni deziras informi vin pri Esperantaj paperaj kaj retaj gazetoj kaj doni al vi nur ĝeneralan analizon de enhavo kaj informoj pri ili.

Ne ekzistas klasifiko de Esperantaj gazetoj. Ni povas klasifiki ilin laŭ diversaj kriterioj: **laŭ tempo de aperado** (jaraj, monataj, tri aŭ kvarmonataj, sesmonataj ks.), **laŭtemaj** (politikaj, fakaj, kulturaj, religiaj, hobiaj, pedagogiaj ktp.), ekzistas **specialigitaj gazetoj** (por blinduloj, virinaj, infanaj), **hobiaj** (naturamikaj, enigmaj, por filatelistoj, ŝakludistoj ktp), laŭ **longeco de aperado**, laŭ **eldonkvanto**. Mi, ankaŭ, povus paroli pri movadaj (por Esperanto), aŭ nemovadaj (per Esperanto), pri tiuj **financataj de ŝtato**, aŭ tielnomataj **sendependaj**, pri **paperaj** kaj retaj, ktp. Mi mencias Esperanto-gazetojn:

1. Esperanto, oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio. Aperadas monate. Eldonkvanto ĉirkaŭ 6.000 ekzempleroj. Estas parto de membrokotizo por UEA. Aperadas 101 jarojn. Estas legata en 115 landoj kaj voĉlegata por vidhandikapitoj. Nuntempa retadreso estas reveuo@esperanto.sk, aŭ reveuo.esperanto@gmail.com.

2. La Ondo, internacia sendependa magazino en Esperanto. Aperas ĉiŭmonate. Estas fondita en 1909 kaj refondita en 1991. Eldonas kaj administras Halina Gorecka kaj Aleksandar Korĵenkov en Kaliningrado, Rusio. Ekzistas papera kaj reta versio. Lastaj numeroj estas prezentitaj voĉmaniere, per specialaj podkasto. Ĝi havas peranton en Serbio. La nuntempa ret-adreso estas sezonoj@kanet.ru. Hejmpaĝo <http://Esperanto.org/Ondo>. Eldonkvanto ĉirkaŭ 700 ekzempleroj.

3. Literatura foiro, dumonata revuo, organo de LF-koop, fondita en 1970 de Literatura rondo „La Patrolo“. Posedas, eldonas, administras Kooperativo de Literatura foiro (LF-koop), Svislando. Retadreso: lf-koop@esperanto.net, kaj la redakcia retpoŝto estas lofo@softhome.net.

4. Kontakto estas ilustrita soci-kultura gazeto por junaj kaj komencantaj esperantistoj. Ĝin eldonas kunlabore TEJO kaj UEA kun ses numeroj jare. Tio estas gazeto pri la mondo, ne pri la movado.

5. Monato, estas gazeto kiu aperas en Esperanto, sed tre malmulte verkas pri E-movado kaj problemoj de lingvo.

6. Heroldo de Esperanto, trisemajna informa gazeto pri la Esperanta mondo. Nuntempe estas organo de Esperanta civito. Aperas 84 jarojn. Abono 38 eŭroj. Retadreso estas: heroldo@esperanto.net. Eldonkvanto nekonata. Ĝi havas peranton en Serbio. Pri eldonkvanto mi nenion scias.

7. Sennaciulo, oficiala organo de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), ĉe ni estas multnombra, ĉar abono estas parto de membrokotizo. Revuo aperas monate. Pri la enhavo de aperintaj artikoloj respondecas aŭtoroj mem. Reta paĝaro: www.satesperanto.org. Retadreso: satesperanto@fri.fr. Ĝi havas peranton en Serbio.

8. Sennacieca revuo, estas jara, sciencfaka kaj literatura revuo de membroj de SAT. Aperas unufoje jare. Eldonkvanto al mi nekonata.

9. Laŭte, estis speciala gazeto de SAT-amikaro, aperadas en Francujo kaj estis tre malofta inter niaj gesamideanoj.

10. Beletra Almanako, nova gazeto kiu anstataŭis „Fonto-n“ kaj komencis aperadi pasintjare, estis taksata tre alte pro siaj kvalito kaj graveco por Esperanto-movado. Mi ne estas informita pri ĝia eldonkvanto, sed mi esperas ke ĝi travivos „infanajn malsanojn“ kaj fariĝos unueca kaj la plej granda monda esperanta literatura revuo, ĉar ĝi tiel startis.

11. Juna Amiko, Internacia Esperanto-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj. La revuo, kiu aperas 3-foje jare (aprilo, septembro, decembro) celas precipe tiujn kiuj jam konas la fundamenton de Esperanto, alproprigis la bazajn gramatikajn regulojn, sed ne trovas legaĵojn en Esperanto kiel eble pli facilajn. La enhavo sekvas la bezonojn de komencantoj. La redakcio preferas mallongajn kaj interesajn verketojn. Plenkoloraj kovrilpaĝoj, dukolora preso kaj multaj ilustraĵoj: desegnoj, fotoj faras la revuon alloga.

12. Espero katolika, estas la oficiala organo de IKUE. Ĝi estas la plej malnova Esperanto-gazeto daŭre aperanta (ekde 1903). La abonantoj povas legi pli ol 200 paĝojn jare. Se Vi interesiĝas pri diversaj artikoloj el EK, bonvolu peti senpagan provkzempleron skribante al IKUE.

11. **Litova stelo**, oficiala organo de litovaj esperantistoj. Aperas monate. Enhavas ĝeneralajn informojn pri Esperanto kaj monda Esperanto-movado. Eldonkvanto 600 ekzempleroj. La unua numero aperis en 1922.

12. **Libera folio**, probable la plej sendependa reta informilo, kie aperas informoj pri aktivado, diversaj opinioj pri E-movado ĝenerale, diskutoj pri lingvaj problemoj, recenzoj de novaj libroj kaj gazetoj. Partopreni en laboro, kunlaboro kaj legado de tekstoj estas senpaga. Adreso: [Libera folio.org](http://Liberafolio.org).

13. **La Karavelo** (kiu aperas monate, rete kaj ankaŭ en papera versio – sesmonate). Adreso: Lakaravelo@google.com. Tre bele kolore ilustrita. Grupo por diskuto – apartan atenton turnas al lingvaj demandoj.

14. **IPR – Internacia pedagogia revuo**, organo de Internacia lingo de Esperantistaj instruistoj (ILEI). Aperadas 37 jarojn. Estas voĉlegata por vidhandikapitoj. Eldonkvanto al mi ne estas konata. Reta adreso: jozefonemeth@yahoo.com.

Vi spertas ke gazetoj plej ofte difinas siajn konceptojn kaj havas similajn enhavojn. Ili ne ŝanĝas vizaĝon dum jaroj. Pli klare, legantoj deziras trovi informojn en difinita loko en la gazeto. Ne forgesu, la gazeto ne estas barelo kien oni devas ĵeti materialojn sen ordo. La enhavo de Esperantaj gazetoj estas simila en diversaj landoj, ĉar problemoj de esperantistoj estas similaj. Do, rubrikoj en Esperantaj gazetoj, interalie, povus esti similaj. Mi proponas kiel sekvas:

1. **Vorto de ĉefredaktoro** aŭ konata esperantisto (ie aparta persono, kiel ekzemple Komitatano Z en La Ondo);

2. **Novajoj** (el landaj asocioj, rilate al societoj, depende de la nombro, aŭ legantaro). Ĉi tie ekzistas: Kroniko, En kelkaj linioj, Kurte, Mozaiko, Unufraze, Eventoj, Mallarĝe, Interne, Per foto kaj teksto..., Fotoraporto, ktp.)

3. **Originala poezio**

4. **Originala prozo**

5. **Tradukoj** (landaj aŭ eksterlandaj)

6. **Intervjuo** (Konata esperantisto, Gasto, Registara funkciulo, Organizanto de aranĝoj, Poeto, Gvidanto de kurso, Paroloj de spertulo)

7. **Organizaj problemoj**

8. **Niaj manifestacioj** (internaciaj kaj landaj – kongresoj, renkontiĝoj, kunvenoj...) „Esperanta kalendaro“, „Niaj aranĝoj“, Okaĵoj, Travivaĵoj)

9. **El mia angulo** (angulo por diversaj opinioj)

10. **Lingvaj demandoj** (novaj vortoj, esperantismoj, neologismoj, barbarismoj, aktualaj vortoj, decidoj de Akademio...)

11. **Novaj libroj** (Ni tralegis, Recenzoj, Ni proponas por legado, Nacia muzo, Novaj libroj, Mondo de libroj, ktp.)

12. **Aktuala temo** (Temo, Tribuno)

13. **El la historio de E-movado** (El malnovaj Esperantaj albumoj, Mi partoprenis, Renkontiĝo de tiu kiun mi memoras, El malnovaj numeroj de...)

14. **Muziko** (tre malofta, lastatempe aparte menciinda en La Ondo). Ĉi tiu rubriko estas tre grava por junaj geesperantistoj, donas bonan materialon por Esperanto-kunvenoj kaj devas esti parto de niaj kulturprogramoj (signifas – gazetoj);

15. **Sporto** (ankaŭ tre malofta en nia gazetaro, ĉar aspektas ke inter esperantistoj ekzistas malmulte da sportistoj). Mi dirus, inter ni ekzistas nesufiĉe da junaj membroj.

16. **Nia gasto** (Esperantisto el nia aŭ el aliaj landoj, konata esperantisto, homo de diversaj fakoj, verkisto de lernolibro, partoprenanto de internaciaj aranĝoj...). Ne forgesu, gasto povas esti laŭ via elekto, aŭ via invito.

17. **Leteroj** de legantoj (Leterkesto, Legantoj skribas al ni, Leteroj, Demandoj, Nia poŝto...)

18. **Interreto** (Lastatempe pli aktualigata pro riĉeco de virtuala mondo: Vidu paĝaron..., El retaj gazetoj, Ni trovis en la reto, Eble vi ne scias, Esperantaj programeroj...)

19. **Amuzo** (Humuraĵoj, Krucvortoj, Anekdotoj, Astrologio, Enigmoj, Rebusoj, Eraroj, Ŝaradoj, Ludoj...)

20. **Anoncoj**

21. **In memoriam**

En fakaj Esperantaj gazetoj ekzistas diversaj rubrikoj depende de fako, aŭ aparta temaro (gazeto de Esperantaj familioj, ĝemeliĝaj urboj, fervojistoj, naturistoj, spiritistoj, instruistoj ks.) kaj mi ne analizis ilin, kvankam tiuj gazetoj povas havi similajn enhavojn, kompreneble, preparitajn por aparta legantaro. Mia opinio, en la fakaj gazetoj aparta loko apartenas al **IPR (Internacia pedagogia revuo)**, sed ĝi ne estas sufiĉe konata inter pedagogoj, escepte de Esperantaj instruistoj. Esperantaj instruistoj povus utiligi ĝin, ĉar iuj spertoj de Esperanto-instruistoj povas helpi al ĉiuj pedagogoj. (Mi mencias spertojn de peterburgaj instruistoj de Esperanto.) Mi devas laŭdi tre riĉajn, tre bele preparitajn (rete) diversajn eldonaĵojn de Brazila Esperanto-movado, kiuj en Eŭropo ne estas sufiĉe konataj (**Brazilei, Bona Volo**).

Esperanto kiel lingvo-ponto.— Ekzistas multaj belaj poemoj kaj rakontoj ĉe tielnomataj malgrandaj popoloj (lingvoj). Bedaŭrinde, tiuj verkoj restas en kadro de naciaj lingvoj. Kial, se ekzistas Esperanto? Ĝi servus kiel lingvo-ponto inter diversaj naciaj lingvoj. Tiamaniere, se ni esperantistoj laboras bone, litovaj legantoj povus legi verkojn de vietnamaj, serbaj, makedonaj, kroataj kaj ceteraj konataj naciaj verkistoj. Kaj tiuj povus legi verkojn de litovaj verkistoj. Tiamaniere ni disvastigos Esperanton, interkonos reciproke kaj konservos la konojn pri naciaj lingvoj.

Nacia literaturo.— Tradukoj riĉigas Esperantan literaturon. Esperantan literaturon ekkonos aliaj naciaj literaturoj pere de tradukoj. Nur verkistoj kiuj estis laŭreatoj el grandaj nacioj aŭ ricevantoj de internaciaj premioj estis ĝis nun tradukataj. Naciajn verkistojn oni devas traduki (nuntempajn aŭ klasikajn) pro ebleco faciligi la tradukadon al aliaj naciaj lingvoj.

Nia gasto.— Iu konata esperantisto (el via, aŭ el aliaj societoj) povas esti Via gasto. Li (ŝi) povas paroli pri diversaj temoj. Tio dependas de via legantaro. Probable, tiun rubrikon havas multaj E-gazetoj.

Ĉu gazeto de unu societo ne povus esti „gasto“ en la gazeto de alia societo? Ĉu pli grandan spacon en unu numero oni povus dediĉi al esperantistoj de alia lando? Kompreneble, reciproke. Eble, kritike, eble pri literaturo, lingvo, popolkantoj, kutimoj...

Kuriozaĵoj.— Ĉiu lando kaj ĉiu regiono havas multajn kulturajn, historiajn memoraĵojn, naturajn kuriozaĵojn, specifajn, por aliaj nekonataj, interesajn por enlandanoj kaj por eksterlandaj legantoj. Se ni diras ke ne estas novaĵo, kiam hundo mordis la homon, sed kiam homo mordis la hundon, tiam ni devas prepari tekstojn pri neordinaraj aferoj, rakontoj pri kuriozaĵoj. Mia sperto montras al mi ke tiaj tekstoj estas tre popularaj. Interŝango de tiuj tekstoj elvokas intereson por pli bona interkonatiĝo.

Por junuloj.— Bedaŭrige realeco en E-movado estas etnombro da gejunuloj. Zorgo pri junaj esperantistoj devas esti pli grava tasko por ĉiuj Esperantaj organizaĵoj, signifas ankaŭ por gazetoj. Rubriko por junuloj kaj pri junuloj devas esti parto de ĉiuj Esperanto-gazetoj. Kunlaboron de gejunuloj estas pli facile organizi, ĉar gejunuloj bone konas la nuntempan komputilan teknologion. Esperanta muziko, ŝanĝo de komputilaj programeroj, babilado, ĉefaj adresoj por Esperantaj aktivadoj, estas nur iuj eblecoj por aktivado de gejunuloj. Kompreneble, por multaj novaj enhavoj.

Esperantaj klasikuloj.— En niaj gazetoj malofte oni povas trovi partojn de verkoj de Esperanto-klasikuloj. Multaj geesperantistoj nenion scias pri Bagi, Lanti, Kaloĉaj, Auld, Lapena kaj aliaj. Fundamenta krestomatio estas fonto por ĉiuj prilaborantoj de Esperanto-gazetoj. Ne forgesu, ĉiu lando havas siajn Esperantajn klasikulojn. Interŝanĝo de tiuj materialoj donas eblecon pli bone konatigi nian literaturon kaj konatiĝi kun la iliaj.

Konataj esperantistoj.— Rubriko en La Ondo *Esperantisto de jaro*, mi estas certa, devas esti en ĉiuj Esperantaj gazetoj. En ĉiu lando loĝas homoj kiuj agas multe por Esperanto-movado en siaj landoj, kaj en la monda movado. Oni malmulte scias pri ili. Ni devas konatigi la mondon kun ili, kio signifas pli bone konatigi niajn membrojn. Simila elekto de la plej bona landa esperantisto estas grava por E-movado kaj por pli bona interŝtata konatiĝo.

Proverboj kaj idiomoj.— Interese estas kiel esprimi la saman penson en diversaj landoj. Proverboj estas mallongaj, sed idiomoj de popolo el unu lando, se laŭvorte tradukitaj, nenion signifas. Iuj idiomoj ekaperis en fora pasinteco. Ekzemple, serba idiomato (Ĝuro kudris al mi) nenion signifas en aliaj lingvoj, sed en la serba signifas ke io tre malbone estas farita. Tiamaniere ni pli bone lernas lingvon kaj ekkonas unuj la aliajn.

Lingvaj ludoj.— Lingvaj ludoj estas maniero ekinteresiĝi junajn esperantistojn por pli facila lernado de nia lingvo. Mi rememoras kiom da intereso dum la kurso de Esperanto provokis **palindromo** „*ne mateno, bone tamen*“, aŭ „*oni volas ovo, salo, vino*“, kvankam la premio estis malmultekosta vortareto. **Paronimoj** (deserto, dezerto), **sinonimoj** (aresti, enkarcerigi, kapti, kateni, malliberigi, sklavigi), fari **kalamburojn** (kuraĝo/kur-aĝo), **sonalternon** (fokstroto/koksfroto) ktp. Tio estis (estas) granda helpo al instruistoj kaj amuza ludo por esperantistoj.

Mi esperas ke ne estas devige konigi vin kun nia serba Beograda Verda Stelo. Ĝi utiligas iujn miajn spertojn en sia laboro. Estus tre bele kiam ĉiuj esperantistoj, membroj de niaj societoj estos abonantoj de tiu nia unueca Esperanto-gazeto.

Ne forgesu, ĉe ni ekzistas unu neordinara Esperanta revuo kiu nomiĝas Primara. Ĝin preparas, verkas, tradukas membro de Beograda E-societo kaj membro de Esperanto-Instituto, d-ro Prbislav Marinković, kromnomata Priba. Ĝi estas ankaŭ interesa, du-lingva, riĉa kaj, miaopinie, meritas plenan atenton de ĉiuj niaj esperantistoj..

Esperanta gazetaro, kiel vi montris, estas multnombra, riĉa, interesa, diversflanka, internacia. Ĝenerale, ĉiuj esperantaj gazetoj estas fermitaj por kunlaboro. Se ni, ĵurnalistoj, diras ke io okazis, sed pri tio nenio estis en gazetoj, esperantistoj devas skribadi pri ĉiuj aktivadoj, pri konataj esperantistoj, pri kuriozaĵoj el siaj regionoj. Tiamaniere, ili fariĝos konataj, influaj, interesaj por socio, por ŝtataj organoj.



BEOGRADA VERDA STELO

je jedini esperantski list u Srbiji.
Godišnje izlaze tri broja, a pretplata je
samo 200,00 dinara
+ poštanski troškovi
(40,00 dinara po broju).

Da li ste se pretplatili?
Ako ste stvarno esperantista,
učinite to u toku trajanja kongresa.



Zlatoje Martinov:

KURTA TRARIGARDO DE LA ESPERANTO LITERATURO MONDA KAJ SERBA

La literaturo en Esperanto ekde la komencoj tre klare kaj sendube anoncis la procezon de a tentika literatura riĉeco surbaze de propraj esprimaj rimedoj, sed anka surbaze de utiligado de naciaj literaturoj pere de tradukista aktivado.

La fino de la 19-a kaj la komenco de la 20-a jarcento estas ĝenerale periodo de forta interpenetrado de naciaj kulturoj, akceptado de fremdaj influoj, noviganteco, neado, sed anka glorado de propra tradicio.

La internacia lingvo estis praktike ideala spaco de interkruĉiĝo de la plej diversaj kulturinfluoj precipe en la mezeŭropa regiono, konsidere ke la plej granda nombro de verkistoj aperis ĝuste en la landoj de la maldekstra kaj dekstra flankoj de Danub-fluo. Cetere la grandan influon sur la Esperantan literaturon igis ĝuste Budapeŝta skolo kun la plej granda esperanto versisto Kalman Kalocsay.

Poemo, nehararde nomita "literatur-reĝino" estas longtempe netuŝebla ĝenro en la Esperanta literaturo, des pli ĉar Zamenhof, la kreinto de la lingvo mem, prezentinte sian planlingvon, publikigis ankaŭ du proprajn poemojn por pruvi la vivantecon de la lingvo kaj ĝian literatur-eblon. Poste venis romano, kaj nur poste aliaj ĝenroj (rakontoj, dramoj, eseoj, vojaĝpriskriboj, k.s.).

Sed kun tempofluo kaj ŝanĝo de trendoj en la mondo, ŝanĝiĝis

anka la gusto de Esperanta legpubliko. Romano pli kaj pli cedas al rakonto kaj tiu ĉi al novelo.

La Esperanta literaturo relative malfrue aliras influojn de la moderna mondliteraturo. La postmoderno kiu en la Okcidento subiras jam trapasis la fazon de tiel nomata post-postmodernismo, nur dum lastaj jaroj produktas certan malgrandan nombron de bonkvalitaj postmodernismaj verkistoj.

La fakto mem ke la pozitivaj influoj de la mondliteraturo grandparte determinas la disvolviĝkurson de la nova literaturo de la internacia lingvo, tre transparente indikas ke ni eniris la novan jarcenton – la dudekunuon – kuraĝiginte ne nur pro la fakto ke la literaturo siaparte certigos pluan normalan kaj senĝenan lingvoevoluo, sed anka pro tiu ĉi mem; nome, sekvante trendojn en tio kion jam Wolfgang Goete nomis *Weltliteratur*, ĝi fariĝos ne nur pli kvalita kaj pli matura, estetike pli proksima al aliaj literaturoj, sed ĝi simple fariĝos egalrajta parto de la mondliteraturo, se ne eĉ ĝi mem..

Sed kio ja okazis literaturesence en Serbio?

La unuaj esperantistoj aperis en Serbio fine de la XIX jarcento. Jam en la jaro 1905 jaro ekis aktivi sinjoroj M. Avramović kaj J. P. Jovanović. Poste aliĝis al ili d-ro Dragomir Andonović. En la jaro 1908 J. P. Jovanović eldonis sian Esperanto-lernolibron por serboj. En la jaro 1910 aperis nova Esperanto-lernolibro de Siniša Buđevac.

Ĝis la 1918. jaro oni ne rimarkas ajnan seriozan literaturan agadon.

Post la Unua mondmilito la Esperanto-movado vaste disvolviĝis en la nova ŝtato, Jugoslavio. En 1932 serbaj kaj kroataj esperantistoj fondis la politikan, socian kaj kulturen revuon *La Suda Stelo* (ĉesis aperi en 1941) en kiu aperadis ankaŭ la literaturaĵojn.

La unua serba Esperanto-verkinto estis Stevan Živanović (1900-1938) kiu verkis romanon *Sonorilo de Bled*.

La vera literatura aktiveco tamen rimarkiĝis nur post la Dua mondmilito, fakte en la kvindekaj jaroj (1954-1958) kiam kolektiĝis, precipe en Beogrado, tre talenta generacio de esperantistoj kiuj verkis originalaĵojn, tradukis kaj eldonis. Tiun grupon faris Antonije Sekelj, Tibor Sekelj (kiu tiutempe ĵus revenis el Argentino), Branko Rajšić, Božidar Trudić, Branko Radaković, Margarette Greta Stoll, Nedeljka Subotić, Vesna Skaljer Race, Petar Stefanović, Milivoje Pavlović, Svetislav Petrović kiu tradukis *La montaran kronon* de P.P.Njegoš, Srđ Arandelović kiu redaktis la plej grandan antologion de la serba poezio de 12-a ĝis la 20-jarcento, kaj aliuloj.

En la refondita *La Suda Stelo* oni verkis poemojn, tradukojn, eseetojn. La signifoplena loko en la tiutempa esperanto-literatura kreado apartenas al tn. „la Beograda triopo“ kiun faris Margarette Greta Stoll, Nedeljka Subotić kaj Vesna Skaljer Race.

La talenta Beograda rondo eĉ eldonis kelkajn librojn de la esperanten tradukita serba literaturo. Tiel Božidar Trudić tradukis *Analfabeto kaj butono* (1955) kaj Antonije Sekelj *Suspektinda persono*-n de Branislav Nušić (1956), Petar Stefanović tradukis esperanten Radoje Domanović (*Meditado de ordinara bovo serba*, 1957) kaj en la sama jaro, sloveno Otmar Avsec tradukis *Travivaĵoj de Nikoletina Bursać* de Branko Ćopić. La plej elstara esperanta literaturisto kiu vivis en Serbio estis certe Tibor Sekelj (1912-1988). Siajn travivaĵojn de multaj mondaj vojaĝoj li lerte transformis en la beletrajn tekstojn el kiuj iĝis diversaj kaj legindaj libroj (*Nepalo malfermas la pordon*, *Tempesto super Akonkagvo*, *Temuĝino*, *la filo de la stepo*, ktp.)

La sesdekaj kaj postaj jaroj de la pasinta jarcento, sendube apartenas al Boriša Milićević (1931), filologo, tradukinto, recenzinto, leksikografo, lernolibro-verkinto. Hodiaŭ li estas la plej signifa

vivanta a toro en Serbio. El inter lia granda opuso menciendaj estas kelkaj: *Lirika poemaro el Vojvodino/Serbio* (Zbirka lirskih pesama iz Vojvodine/Srbije 1983), *Mi esperas amon* (antologio de la poezio el nealiancaj landoj) 1989., kaj ĵus en beograda literatura revueto *Beograda Verda Stelo* oni publikigas lian tradukon de Simo Matavulj *Bakonja frat' - Brne*. Milićević estas ankaŭ aŭtoro de lernolibro (*Esperanto međunarodni jezik – udžbenik za ekspresne početne kurseve*) kiu ĝis nun havis naŭ eldonojn.

Same tiutempe ekaktivis Gvozden Sredić (1935) lernolibroverkinto kaj tradukisto, Živko Ivanović kiu faris du antologiojn - de la serba parola literaturo, 1991 kaj de la serba skriba poezio, 2002), Radojica Petrović, matematikisto, kiu lerte tradukadis poemojn kaj novelojn ambaudirekte (esperanten kaj serben).

Dum la sepdekaj jaroj (precipe post 1976) aperis du novaj nomoj kiu da rigis serban Esperantan literaturan tradicion, Jovan Zarković kaj Zlatoje Martinov. Zarković okupis sin pri la tradukoj (reprezentita per siaj du tradukoj en la *Antologio de la serba poezio 1200-2000* kiun redaktis Srđ Arandelović, Beogrado, 1998) kaj pri la lingvistiko.

Zlatoje Martinov estas publicisto kaj literaturisto kiu verkas en la serba kaj en Esperanto. Verkas recenzojn, literaturajn kritikojn, eseojn, kaj ankaŭ tradukas. Tradukis en Esperanton famajn serbajn verkistoj David Albahari (*Eklampsio en remizo, 1990*) kaj Desanka Maksimović (*Ozono de naskiĝloko, 1991*) kaj faris dulingvan antologion de la serba porinfana poezio *Al la mondo donace* kiu fariĝis libro de la jaro (1997 dum UK en Adelaide, Aŭstralio). Tradukis eĉ 53 poemojn de la serbaj poetoj por la *Antologio de la serba poezio 1200-2000* (Beogrado, 1998).


Lastatempe la emerita ĵurnalistino Dimitrije Dišo Janičić verkas poemojn kaj noveletojn kaj publikigas ilin rete kaj en diversaj esperantaj revuoj eksterlandaj kaj en *Beograda Verda Stelo*. Oni

ankaŭ devas mencii literaturan kaj tradukan kontribuon de Kalman Kovač, Vladimir Kirda Bolhorves, Terezija Kapista, Agnesa Eremija, Laslo Husar el Kanjiža, ktp.

Ĝenerale, oni povas diri ke la serba esperanto-literaturo grandskale stagnas. Oni malmulte aperigas en la esperantaj literaturaj revuoj (nur de tempo al tempo tion faras Boriša Milićević, Dimitrije Janičić, Radojica Petrović kaj Zlatoje Martinov), ne eldonas novajn librojn, ĉu originalaĵojn ĉu tradukaĵojn. Dum pli ol cent jaroj oni bedaŭrinde tradukis esperanten nur 25 librojn de la serbaj aĵoj, sed nesisteme, la ne ĉiam bona sento de la tradukintoj kaj kun ofte duba kaj netrafa traduk kvalito.

La nuna generacio de esperantistoj, precipe tiuj kiuj hodiaŭ konsistigas Esperanto-Instituton, devas klopodi plibonigi la „literaturstaton“ en la serba parto de Esperantujo. La revueto *Beograda verda stelo*, kvankam modesta, estas grava instigilo en tiu direkto.





Da li ste znali da postoji i
esperantski elektronski list

PRIMARA

koga piŝe, izdaje i rastura
ĉlan naŝeg Instituta
dr Pribislav Marinkoviĉ.

Ako imate kompjuter i ŝelju da
ĉitate interesantne tekstove na
esperantu i srpskom, javite se na
e-mail primara@telekom.yu



Pribislav Marinkoviĉ: **KONTRIBUO DE ESPERANTO AL ENKONDUKO DE LA SERBA EN LA MONDAN BELETRON**

*Tradukaĵoj estas kiel virinoj:
kiam ili estas belaj, ne estas fidelaj,
sed kiam ili estas fidelaj ne estas belaj*

Franca eldiro

La monda beletrio konsistas el opaj naciaj beletroj. Ĝi estas ampleksa kaj grandega. En la mondo troviĝas kelkaj miloj da naciaj lingvoj. Ne ĉiuj el ili havas siajn beletrojn.

La serba popolo estas malmultnombra, el la monda vidpunkto, kaj faras nur procenteron de la monda loĝantaro. Ĝia literaturo, sendepende kiom valora, estas konata nur de konantoj de la serba lingvo. Krom serboj tiun lingvon parolas preskaŭ ĉiuj popoloj iam vivintaj en Jugoslavio. Do, nur ĉirkaŭ 20 milionoj da homoj povas ĝin legi.

Nesciantoj de la serba lingvo povas legi la serban verkaron nur en tradukaĵoj. La plej bonaj libroj, perloj de la serba beletrio, estas tradukitaj plejparte en la lingvojn de la grandaj nacioj. Sed ĉu ilin povas utiligi loĝantoj de malgrandaj nacioj, nesciantaj la lingvojn de la grandaj nacioj, al kies lingvoj la serba beletrio ne estas tradukita? Jes, se oni scias Esperanton kondiĉe ke tiuj serbaj perloj estas tradukitaj al la internacia lingvo.

Do, la serba beletro povas veni en la manojn de homoj kondiĉe ke ili konas:

- la serban lingvon (limigita nombro je la 20 milionoj, minus alfabetoj kaj granda nombro de seninteresiĝantoj pri beletro);
- la lingvon al kiu estas tradukitaj malmultaj verkoj (la angla, franca, germana, rusa, hispana ktp.);
- la IL-n. Sed preskaŭ nenio estas tradukita, escepte de kelkaj libroj kaj kaj relative malmulte da poemoj.

Konkludo estas ke se ni deziras ke la serba beletro estu konata en la mondo oni nepre devas traduki Esperanten kaj ebligi senpere legi en la IL, aŭ traduki ĝin en naciajn lingvojn pere de Esperanto. Tiam Esperanto fariĝus vere pontlingvo por la popoloj kun malmultnombra loĝantaro.

Kio estas tradukita el la serba literaturo?¹ Ni konsideru nur du branĉojn, sed la plej gravajn: poezion kaj prozon.

El poezio, nomita "literatur-reĝino", nepre devas mencii: antologiojn de S. Arandelović² kaj Ž. Ivanović³. Ankaŭ verkon de Svetislav S. Petrović brile tradukinta la *Montaran kronon*. Tradukadis multe Boriša Milićević⁴. Zlatoje Martinov⁵, Margarethe-Greta Stoll,

¹ Vidu: B. Milićević, *Bibliografio de Esperanto-tradukoj el Jugoslavia literaturo*, 1977-1983, N. Sad, 1987; B. Milićević, *Esperanto tradukoj el Jugoslavia literaturo 1977-1983*, N. Sad 1987; *Esperanto bibliografio en Jugoslavio*, en la libro Danubo – rivero de kunlaboro, pĝ. 84-91, Bgd 2001; Bibliografija književnih prevoda na Esperanto, (Republika Srpska), en la libro Eblecoj kaj limigoj..., p. 23-36, Banja Luka 2003.

² *Antologio de la serba (1200-2000)*, kiun kompilis Srđan Arandelović, eld. Serbia esperanto Ligo kaj Margarethe-Greta Stoll (tradukis pli ol 120 poemojn), pĝ. 500, Beograd 1998.

³ *Antologio de la serba skriba poezio*, *Antologio de la serba parola literaturo*, kiun kompilis Živko Ivanović, pĝ. 240, Beograd 1991 kaj 2002.

⁴ Boriša Milićević tradukis multajn poemojn, kompilis *Lirika Poemaro el Vojvodino* (Serbio), p. 94 (+4), Novi Sad, 1983; la romanon *Bakonja frat'-Brne* de Simo Matavulj, nun aperanta en Beograda verda Stelo, vidu ankaŭ Propran Bi(bli)ografion, Banja Luka 2003.

⁵ Zlatoje Martinov verkis: *Ozono de naskiĝloko* de Desanka Maksimoviĉ, (64 p.), eld. SEL, Beograd 1991; *Al la mondo donace*, *Antologio de la serba porinfana poezio*, eld. Strategia, Beograd 1996 (2x80 p.)

Antonije Sekelj⁶ kaj ankoraŭ kelkaj aliaj tradukantoj. Diversaj tradukitaj poemoj troviĝas en E-gazetoj kaj revuoj. Estus tre utilinde traserĉi ilin kao evidentigi liston de tiuj tradukaĵoj. Ĉu Esperanto-instituto povas transpreni tiun indan taskon? Estas same grave konstati ke iuj poemoj estas preskaŭ netradukeblaj, kaj la aliaj povas ricevi pli bonan kvaliton ol estas en originalo, kiel konstatas Gojko Božović (en *Politika*, 1. XII 2007).

En la prozo estas tradukitaj nur kelkaj verkoj. Mi menciu la plej gravajn, troviĝantaj en la apartaj libroj. En opaj E-gazetoj kaj ĵurnaloj oni povas trovi nur malgrandajn kaj malpli verkintojn, ofte nur fragmentojn de iu romano aŭ novelo. Ĉi sube mi prezentas la liston de romanoj kaj rakontojn kiujn oni devas kiom eble plej urĝe traduki. Estas ĝuste ke ĝenerale nun romanoj ĉiam pli cedas lokon al noveloj kaj al pli kurtaj rakontoj. Dramoj, vere, restas ĉiam interesaj. Same estus dezirinde traduki verkojn el aliaj branĉoj: eseojn, popolajn poemojn, kritikojn ktp.

La serbia esperantistaro havas sufiĉe da fortoj, estas kelkaj dekoj da bonegaj konantoj ne nur de la IL, sed ankaŭ de tradukarto kaj jam sperton en tiu kampo, bedaŭrinde ĝis nun ne estis organizita laboro pri tiu tasko, nek ĉe la E-societoj nek en urboj, nek en E-instituto.

Fine, kion oni devas en baldaŭa tempo traduki Esperanten el la serba literaturo? Ekiru hronologie, de la XIX jarcento kiam ĝi komenciĝis iom post iom disvolviĝi al la nuna riĉa, valora kaj respektinda literaturo kun monda renomo. Ĝi, laŭ mia opinio, nun superas multajn beletrojn de la popoloj similnombraj al la serba popolo.

⁶ Antonije Sekelj tradukis: *Buŝo plena je tero* de Branimir Ŝćepanović, Beograd 1994 (108 p.), tradukita al pli ol 16 de naciaj lingvoj; *Suspektinda persono* de B. Nuŝić, p. 56, SEL, Beograd 1956.

La listo⁷ enhavas beletristojn el kvin periodoj: romantismo, realismo, la serba moderna beletro, la beletro inter du militoj kaj la moderna serba, postmilita beletro. Laŭ la skribo oni povas facile diveni kiuj verkoj estas tradukitaj (skribitaj *kursive en Esperanto*) kaj kiujn oni devas traduki (serblingve, substrekita):

ROMANTISMO:

Branko Radičević: Tradukitaj: *Kiam mi pensis morti*, tradukis Milivoje Pavlović, alterne (*Pensoj miaj al morto turniĝas*, tradukis Živko Ivanović) *Adiaŭo de lernantoj*; Tradukendaj: Tuga i opomena.

Dura Jakšić: *Patrujo, En la Tiliaro, La vojo al Gornjak, Je noktomezo; Jelisaveta, knjeginja crnogorska, Stanoje Glavaš*.

Jovan Jovanović Zmaj: *Tri hajdukoj, La lumaj tomboj; Đulići kaj Đulići i uveoci, kaj Lem-Edim*.

Petar Petrović Njegoš: *La montara krono kaj La torĉo mikrokrozma* (fragmentoj). Estas tradukinda Noć skuplja vijeka.

Laza Kostić: *Santa Maria della Salute* kaj aliaj. Tradukendaj: Maksim Crnojević kaj Pera Segedinac.

Vojislav Ilić: Tradukitaj: *Tibulo, Vintra idilo, Griza morna ĉielo*. Tradukenda: Korintska hetera.

REALISMO:

Laza Lazarević: Švabica, Prvi put s ocem na jutrenje, Sve će to narod pozlatiti.

Petar Kočić: *Jazavac pred sudom, Mrguda, Mračajski prota, Kroz mečavu, Vukov gaj*.

Branislav Nušić: *Suspektinda persono, Narodni poslanik, Gospođa ministarka*.

⁷ La liston, kun ŝanĝetoj, rekomendas Milivoje Spasić, beograda profesoro pri la serba lingvo kaj literaturo, al kiu la artikolverkanto varme dankas.

Milovan Glišić: Glava šećera, Podvala.

Stevan Sremac: Zona Zamfirova, Vukadin, Kir Geras.

SERBA MODERNA BELETRO:

Jovan Dučić: *Dubrovnikaj madrigaloj (cikloj), Mia poezio, Sunsubiro, La sunfloroj, La steloj, Vilaĝo, Marsaliko, Pesma ženi*.

Aleksa Šantić: *Emina, Antaŭfesta vespero, Unu larmo, Ne kredu, Resti ĉi tie, Mi znamo sudbu*.

Milan Rakić: *Jefimija, Simonida, Ampoemo, Sincera poemo, Orkideo, Ordinara kanto*.

Vladislav Petković Dis: *Eble ŝi dormas, Nirvano*

Sima Pandurović: *Perlaj okuloj, Svetkovina*.

Borislav Stanković: *Koštana, Tanana, Neĉista krv*.

Vojislav Ilić Mlađi: *Patrino kaj filo, La letero al soldato, Sonoras, Lasta deziro al d-ro Reiss*.

BELETRO INTER DU MILITOJ:

Milutin Bojić: *La blua tombejo, Gospođa Olga*.

Miloš Crnjanski: *Lamento pri Beograd, Seobe, Dnevnik o Čarnojeviću, Roman o Londonu*.

Momčilo Nastasijević: Sedam lirskih krugova.

Rastko Petrović: Dan ŝesti, Ljudi govore.

Desanka Maksimović: *Mi petas indulgon, Ozono de naskiĝloko*.

Isidora Sekulić: *Kronika palanaĉkog groblja, Ĝakon Bogorodiĉne crkve, Pisma iz Norveške*.

Ivo Andrić: *La ponto super Ĵepa, La ponto super Drino* (fragmento), *Eks ponto* (fragmento), *Maltrankviloj* (tri fragmentoj), *Vintre, Olijacianoj, Ekstradicio de Rigas Fereos, Travniĉka hronika, Gospođica, Prokleta avlija*.

MODERNA, POSTMILITA BELETRO**Vasko Popa:** Kora, Uspravna zemlja.**Meša Selimović:** La Dervisxo kaj la morto, Tvrđava, Ostrvo**Antonije Isaković:** Tren I**Miodrag Pavlović:** zbirka sa 87 pesama.**Dobrica Ćosić:** Koreni, Deobe, Vreme smrti, Vreme vlasti.
Prijatelji.**Borislav Mihailović Mihiz:** Autobiografija o drugima.**Borisav Pečić:** Besnilo, Godine koje su pojeli skakavci, Kako upokojiti vampira.**Danilo Kiš:** Grobnica za Borisa Davidovića, Enciklopedio de mortintoj, fragmenton tradukis Agnesa Eremija, Ĉas anatomije.**David Albahari:** Eklampsio en remizo, Mamac**Svetlana Velmar Janković:** Lagum, Nigdina, Bezdno, Dorĉol.**Aleksandar Tišma:** Uпотреba ĉoveka.**Dušan Kovaĉević:** Balkanski ŝpijun.**Goran Petrović:** Opsada crkve sv. Spasa, Sitničarnica kod sreĉne ruke.

Cxe ordigo de la supercivitaj verkoj de poezio kaj prozo estas evidente ke estas entute malmulte da literaturistoj de poezio kaj prozo. Kiom da paĝoj entute estas tradikendaj nur dio sciuss.

En tiu ĉi listo ne eniris la plej novaj beletristoj mi menciu nur kelkajn: Mira Aleĉković, Miroslav Antić, Milovan Vitezović, Milovan Danojlić, Dobrica Erić, Dragan Lukić, Branko V. Radiĉević, Dušan Radović, Stevan Raiĉković, Ljubivoje Ršumović, Andra Franiĉević, Branislav Cvetković, Branislav Crnĉević ktp.

**Gvozden Sredić****ESPERANTO
KAJ
LA FERVOJO**

Esperanto estis ekde ĝia komenco tre interesa lingvo por fervojistoj. Fervojaj laboristoj vojaĝas tra diversaj landoj kaj devas koni diversajn lingvojn, kio estis kaj estas tre malfacila afero. Pro tio Esperanto estis por fervojistoj tre bona solvo kaj inter fervojistoj estis kaj estas multnombraj esperantistoj.

Post la Dua mondmilito fariĝis organizo de fervojistoj esperantistoj – IFEF. **IFEF, Internacia Fervojista Esperanto-Federacio**, estis kreita en 1948. Celo de IFEF estas disvastigi kaj aplikadi Esperanton en la fervojaj administracioj kaj en la fervojistaj medioj kaj rondoj. Ekzemple, kelkaj fervojkompanioj uzas Esperanton en siaj internaciaj horar-libroj. Dum dek jaroj inter tiuj fervojkompanioj estis ankaŭ Jugoslaviaj fervojoj.

Ja, kiel en ĉiuj medioj, kie necesas komuniki kun nesamlingvanoj (internacia komerco, diplomaciaj aferoj, turismo, ktp.), ankaŭ la fervojoj devas fronti tiun problemon, kiu pli kaj pli sentblas en la nuna epoko, kiam pli ol iam ajn antaŭe kreskadas la kvanto da internaciaj kontaktoj, ne nur por vojaĝantoj sed ankaŭ por la fervojistoj mem.

Tra la jarcentoj estis provitaj multaj solvoj, sed ĝis nun sen plenkontentiga sukceso. Nome, ne ĉiuj kapablas paroli ĉiujn lingvojn (kiom da homoj vere sufiĉe bone regas alian lingvon, krom la gepatra?). Malgraŭ grandegaj temp- kaj mon-investadoj de la sin-

sekvaj registaroj (jam de pluraj jardekoj oni instruas lingvojn), la problemo restas nesolvita. La aŭtomata tradukado ankoraŭ havas longan vojon por montri sin efika. Estis proponitaj multaj solvoj, sed la komunik-problemo plu restas.

Fronte al tio, la uzado de Esperanto montris sin la plej efika kaj la plej taŭga: lernado multe pli rapida ol de iu ajn alia lingvo, neŭtraleco, ktp. Jen koncize, pro kio IFEF celas disvastigi Esperanton en fervojaj medioj:

- IFEF estas membro de FISAIC, Internacia Federacio de la Artaj kaj Intelektaj Fervojistaj Asocioj.
- IFEF aliĝis al UEA (Universala Esperanto-Asocio) en 1953.
- La devizo de IFEF estas: "*La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn.*"
- IFEF grupigas membrojn en pli ol dudeko da landoj: Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥio, Ĉinio, Danio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Japanio, Kroatio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Rumanio, Serbio, Slovakio, Slovenio, Svisio.

Aparte mi mencias ke baza teksto pri IFEF estas tradukita en naciajn lingvojn. Nia membro Dimitrije Janičić tradukis tiun tekston en la serban, kaj sur la paĝaro de IFEF vi povas tralegi ĝin.

Mi estis plurjara vicprezidanto de IFEF kaj aktive partoprenis en preparoj de kongresoj kaj kongresaj dokumentoj. Kune kun s-ano Janičić mi tradukis kaj preparis grandan UIC Leksikonon de fervojaj terminoj kiun ni prezentis en la Kongreso de IFEF en Peĉ

Fervojistoj de la eksa Jugoslavio estis aktivaj membroj de IFEF. Kunlaboro estis organizita tra la aktivado de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj. JAFE estis tre aktiva en laboroj de IFEF.

FAKA LABORO

En agado de niaj fervojistoj esperantistoj ĉiam granda atento estis dediĉita al la faka laboro. Fervojistoj aperigadis multnombrajn

fakajn prelegojn kaj dum kongresoj ĉiam estis atentema faka parto de kongreso. Fakaj prelegoj ekde la jaro 1992 aperis ĉe la eldoninto "Kava-Peĥ". Dum lastaj 15 jaroj aperas tielnomataj "Fakaj kajeroj". Bedaŭrinde, en ĝi aperadas fakaj verkoj de nur kelkaj niaj fervojistoj. Tiamaniere en la unua Faka fervojista kajero aperis teksto de nia forpasinta kolego inĝeniero Lajoš (Ludoviko) Sekereš sub la titolo "Ek al seneraraj fervojfakaj tekstoj". En la kajero 4 aperis mia verkaĵo "Sinergiaj efektoj de intergrigo de societoj Intercontainer kaj Interfrigo". En la 5-a kajero aperis du tekstoj de niaj fervojistaj fakuloj: s-ro Sekereš aperigis la verkaĵon "*Purigado, lavado kaj desinfektado de varvagonoj*" kaj mi preparis la verkaĵon sub la titolo "*Malaperis la "fluganta" rado*". En la kajero 6 estis aperinta mia verkaĵo "*Amasa konstruado de fervojaj tuneloj*", en la 7-a - la verkaĵo "*Grandrapidaj fervojaj linioj en Balkanio*", en la kajero 10 – la verkaĵo de Sekereš "*Ŝanĝo de naturo per konstruado de fervojlinioj*" kaj mia verkaĵo "*Eksteraj kostoj de trafiko*". Fine, en la numero 11 (2003) aperis mia verkaĵo sub la titolo "*Aliĝo de orienteŭropaj fervojoj al transeŭropaj koridoroj*", kie aparte mi verkis la tekston pri Koridoro X.

Mi aparte trovas menciinda ke mia *lernolibro por fervojistoj* travivis ses eldonojn kaj estis unu el la plej bonaj lernolibroj de internacia lingvo sur areoj de la eksa Jugoslavio.

Miaopinie valora eldonaĵo de fervojistoj esperantistoj estis ankaŭ la ilustrita *Kvinlingva terminaro pri kombinita trafiko*. Eldonisto estis Savez tarifera, sed esperantistoj preparis la eldonon.

TRADUKO DE INTERNACIAJ TRAFIKDOKUMENTOJ

Aparta sukceso de fervojistoj esperantistoj estas traduko de internaciaj fervojaj dokumentoj CIM, CIV kaj COTIF. Preskaŭ du jarcentoj pasis post la kreo de la fervojo. Post la unuaj paŝoj en Anglio, en la jaro 1825 la fervojo transpasis al Eŭropo kaj aliaj kon-

tinentoj. Baldaŭ ĝi fariĝis internacia trafikilo kiu ligis diversajn landojn sekure, rapide kaj ekonomie. Unuflanke tio estis bona, ĉar tio instigis internaciajn varinterŝanĝon kaj kontaktojn inter homoj apartenantaj al diversaj nacioj. Aliflanke tio kreis novajn problemojn de la jura naturo por kiuj oni devis trovi iun komunan solvon.

La unua solvo estis kreo de la Internacia konvencio pri la fervoja vartrafiko – CIM. Tiu kiu praktike ekvalidis la 1-an de januaro 1893. Tri jardekojn poste estis kreita simila jura instrumento por reguligo de internacia pasaĝera trafiko – CIV. Tiuj bazaj juraj dokumentoj por la internacia fervoja trafiko estis poste de tempo al tempo adaptitaj al la Inovaj sociaj, ekonomiaj, politikaj kaj teknikaj cirkonstancoj en kiuj okazis fervoja trafiko, sed fakte ili ĝis nunaj tagoj gardis siajn ĉefajn trajtojn.

Konkorde al tempo en kiu ili ekestis, ambaŭ konvencioj estis oficiale faritaj en franca lingvo kun tradukoj al pluraj naciaj lingvoj. La unua Esperanta traduko aperis nur en la jaro 1930 el la plumo de ĉeĥo Josef Rebiček, kaj en la jaro 1967 aperis nova traduko de la Internacia konvencio pri la fervoja pasaĝer- kaj pakaĵ- trafiko, kies aŭtoroj estis germanaj kolegoj Wilhelm Barnickel kaj Gernot Ritterspach. Esperantaj tradukoj vekis grandan interesiĝon ne nur inter esperantistoj, sed ankaŭ en ceteraj fakaj rondoj.

En la jaro 1968 al tiu aktivado aliĝis ankaŭ niaj esperantistoj. Por la 20-a IFEF-kongreso en Varna oni eldonis tradukon de CIM kiun prizorgis Josip Zupanič kaj Lajoš Sekereš (antaŭ nelonge mortinta). Baldaŭ post tio en la jaro 1985 eldonaĵo aperis surbaze de malavara financa apogo de gazeteldona kaj propaganda institucio de Ĝenerala direkto de nia tiama fervojo, kiu jam ofte montris sian vastan komprenemon por klopodoj de esperantistoj.

Baldaŭ nia Asocio aperis kun nova verko. Temas pri Konvencio COTIF kiu anstataŭis ambaŭ pli fruajn fervojajn dokumentojn CIV kaj CIM. COTIF estas farita oficiale en la franca kaj germana

lingvoj kun oficialaj tradukoj al la araba, angla, nederlanda kaj nun ankaŭ en Esperanto kaj serba lingvoj.

IFEF partoprenas en la laboro de RailLexic: pli da informoj poste, sed vi jam povas iom legi el UIC-paĝoj: angl-, franc-, german- lingve. Resume, temas pri tradukado al plej multaj lingvoj de pli ol 16.000 terminoj de la internacia fervoja terminaro de UIC). Notinde estas, ke la Esperanto-parto enestas inter ĉirkaŭ 20 aliaj lingvoj kaj troviĝas inter la plej kompletaj, ĉar la tutan jaron prilaboradis ĝin diverslandaj fakuloj, perkoresponde aŭ dum kunvenoj, dum aŭ ekster la jara kongreso.

"JUGOSLAVIA FERVOJISTO"

IFEF eldonas la bultenon "Internacia Fervojisto", en kiu oni povas legi ekz. pri:

- la aktivaĵoj de IFEF
- fervojaj aktualaĵoj en la mondo
- anoncoj de venontaj kongresoj
- raportoj pri pasintaj renkontiĝoj ktp

Bulteno de esperantistoj el iamaj Jugoslaviaj fervojoj komencis aperadi antaŭ duono de jarcento. Bedaŭrinde, la lastaj numeroj aperis antaŭ kelkaj jaroj. Nun, serbiaj esperantistoj fervojistoj ne havas bultenon, kvankam Esperanta societo "Branko Maksimović" estas forta kaj aktiva societo. "JUGOSLAVIA FERVOJISTO" aperadis dum longa periodo kiel organiza kaj faka organo de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE).

La unua numero de JUGOSLAVIA FERVOJISTO aperis en sufiĉe modesta multobligita formo en la jaro 1956 kiel organo de Fervojista Esperanto-Societo Zagreb. Post nelonga tempo oni decidis transformi ĝin al organo de JAFE kiu estis fondita ĵus unu jaron pli frue. La loko de aperado kaj la plej granda parto de la redakta komitato restis longe en Zagreb. Post la unuaj malfacilaĵoj,

JUGOSLAVIA FERVOJISTO komencis aperadi monate kiel vera revuo: presita kaj riĉe ilustrita plej parte dank' al subteno de la Fervoja presejo en Zagreb. Bedaŭrinde, tiu ""brila" etapo ne daŭris longe: oni frontis multajn malfacilaĵojn kaj finfine la revuo translokiĝis al Beograd, denove aperante en pli modesta dumonata ritmo.

La aktuala etapo komenciĝis antaŭ nelonge. Ek de la jaro 1997 JUGOSLAVIA FERVOJISTO havis novan aspekton dank' al apero de komputilo (kaj de nia teknika redaktoro D. Janičić). La nova aspekto ne solvis aliajn problemojn, precipe tiujn financajn, sed tio jam estis kutima afero. Bedaŭrinde, ne ekzistas novaj homoj kiuj estas ekinterese maj daŭrigi aperigadon de la bulteno. Nuntempe, la bulteno ne aperas.

ALIAJ AKTIVECOJ

En la kadro de IFEF funkcias ankaŭ fervoja koresponda servo. La uzado de tiu servo far la asoci-membroj estas simpla : sufiĉas indiki sian nomon, aĝon, adreson, el kiu(j) lando(j) oni deziras korespondant(in)ojn kaj pri kiuj temoj, kaj aldoni internacian respond-kuponon.

Fervojistaj esperantistoj membriĝas en aliaj organizoj de esperantistoj, en UEA, SAT kaj aliaj organizaj formoj de esperantistoj. Esperanto-societo "Branko Maksimović" antaŭ du jaroj estis ĉefa kaj tre sukcesa organizanto de la 78-a kongreso de SAT en Beograd.

Membroj de fervojaj societoj partoprenas en diversaj aktivadoj de Esperanto-movado en la mondo. Iuj el ili estas laŭreatoj de literaturaj konkursoj, membroj de internaciaj esperantaj organizaĵoj, funkciuloj en ili kaj aktivaj en diversaj agadoj de esperantistoj en la mondo. Mi aparte mencias s-inon Tereza Kapista, vicprezidantino de Beograda Esperanto-societo, nia A komitatano en UEA kaj monde konata Ĉe-instruistino.

Esperantaj societoj de esperantistoj fervojistoj ekzistis en Beograd, Novi Sad, Niš, Kraljevo, Jagodina, Leskovac kaj Vranje. Nuntempe aktivaj kaj laboremaj estas nur la societoj en Beograd kaj Niš. Bedaŭrinde, niaj membroj estas ĉiam pli maljunaj. Tre malmultaj estas junaj membroj kaj tio devas esti la plej grava tasko por ni – plijunigi membraron en niaj societoj.

KONGRESOJ DE IFEF

IFEF organizas ĉijare kongresojn de fervojistoj esperantistoj. Niaj fervojistoj esperantistoj partoprenis ĉiujn IFEF-kongresojn. En iama Jugoslavio fervojistoj organizis kongreson en la jaro 1957, en la urbo Rijeka.

Ĉi-jare okazos la 60-a kongreso de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) en Poznań (Pollando) de la 17a ĝis la 24a de Majo 2008.



Saraĉujete li u svome listu

BEOGRADA VERDA STELO?

Poŝaljite prilog, vest, fotografiju, pesmu, priĉu, svoj nauĉni rad, svoje filozofsko razmiŝljanje, rado ĉemo objaviti. Naŝ list je postao list srpskih esperantista, samo ŝto se prepara i izdaje u Beogradu.

Zaŝto Vaŝe druŝtvo ne gostuje svojim prilozima u listu? Neka to bude specijalni broj BVS Vaŝega druŝtva!



Radojica Petrović

LERNI KAJ INSTRUI ESPERANTON NUN KAJ ĈI TIE

La parolantaro de Esperanto estas lingvo-komunumoj kiu ne povas certigi sian ekziston per natura kresko – naskado de novaj parolantoj. Ekzistas esperantistaj familioj en kiuj Esperanto estas denaska lingvo jam por tria aux kvara generacio, tamen ne sufiĉe multaj por vivteni la Esperanto-komunumon. La pluekziston garantias nur instruado kaj lernado de la lingvo en ajna vivojaro, ekde la bazlernejo ĝis la pensiula aĝo. Ekde la unuaj tagoj de sia ekzisto tra tuta sia historio Esperanto pruvis sian vitalecon kaj adaptiĝemon al ĉiuj formoj kaj kondiĉoj de lernado: aŭtodidakte aŭ en lernejoj kaj universitataj kursoj, subĉiele aŭ en klubejoj, per radioelsendoj aŭ korespondaj, gazetaj, televidaj kaj komputilaj kursoj. Ĉiuj ĉi formoj plu ekzistas kaj aplikatas, tamen la perkonputila lernado de Esperanto evoluis eksplode en la lasta jerdeko. Fakte, la tutmonda komputila reto, nomata interreto, aŭ mallonge nur reto, donis al la Esperanto-movado novan evoluimpulson provizante la diasporecan lingvokomunumon de esperantistoj per rimedo de rekta kaj tuja interkomunikiĝo.

Esperanto rete

Se vi donas la serĉvorton “esperanto” al iu retserĉilo, ekzemple Guglo (Google, bildo 1) vi ricevos respondon pri trovo de kelk-

dek milionoj da retlokoj, paĝoj aŭ dokumentoj kiuj rilatas al Esperanto. Jahoo (Yahoo!) redonas eĉ pli ol 100.000.000, provu.



Bildo 1. Trovlisto de Guglo pri Esperanto

Kelkaj trovoj laŭ la serĉvorto *esperanto* eble kondukos al retejoj de neesperantistoj kiuj elektis la belan vorton *esperanto* kiel sian ŝildvorton, ofte eĉ ne sciante ĝian ĝustan signifon. Sed tiaj estas tre raraj. La ceteraj kelkdek milionaj trovoj de Esperanto en la reto trafas retpaĝarojn kiuj informas pri la Esperanto-vivo kaj Esperanto-kulturo, ĝiaj institucioj, eventoj, agantoj kaj uzantoj, esperantistaj iniciatoj, projektoj kaj interesgrupoj. Multaj estas esperantistaj retpoŝtaj dissendolistoj kaj retforumoj dediĉitaj al plej diversaj movadaj kaj ekstermovadaj temoj. Vojon al la esperantistaj retejoj kaj retresursoj eblas trovi ankaŭ tra, ekzemple, Multlingva Informcentro pri Esperanto (www.esperanto.net) kaj Virtuala Esperanto-Biblioteko (www.esperanto.net/veb)

Perreta lernado de Esperanto

Ne hazarde Guglo, kiu mem uzas Esperanton unter pluraj aliaj lingvoj, metis la retpaĝaron www.lernu.net de la projekto *lernu!* sur la unuan lokon de sia trovlisto, kiel videblas sur la bildo 1. Temas

pri multlingva retportalo (bildo 2) kun 17 elektronikaj kursoj de Esperanto disponeblaj en 24 lingvoj, interalie: araba, kataluna, angla, hispana, hungara, rusa, hebrea, ĉina, supra soraba k.c. (bildo 3). La kursoj estas adaptitaj al diversaj niveloj de lernado: enkonduka, baza, meza, alta. Luj el ili prezentas en elektronigita formo kelkajn famajn tradiciajn lernolibrojn, ekzemple: *La Zagreba Metodo*, *Gerda malaperis*, *La tuta Esperanto*, *Vojaĝo en Esperanto-lando*, kaj la televida kurso *Pasporto al la tuta mondo*.



Bildo 2. Kursaro de lernu.net

La ceteraj 12 kursoj estis origine kreitaj por elektronika lernado de Esperanto. Tio signifas, ke ili plene utiligas la modernajn faciligojn de perkomputila lingvolernado: tekstojn, bildojn, sonojn, skribajn kaj buŝajn ekzercojn, bildstriojn, filmetojn, elektronikan bibliotekon, forumojn, tujmesaĝilon, multlingvan elektronikan vortaron k.c. Kaj ĉio tio estas adaptita al la specifaj strukturo de Esperanto kaj etoso de Esperantujo. Ekzemple, la unua el la proponataj kursoj por komencantoj, titolita *Mi estas komencanto*, per la plej simplaj sed plej ofte bezonataj frazoj el la vivo de esperan-

tistoj ebligas al la lernantoj lerni kaj praktiki bazan vortrezoron, korrekta prononco, literumado, skribado kaj konversacion, kaj samtempe renkontigas ilin kun situacioj en kiuj la lernita lingva materialo praktike uzatas.

Lingversioj de lernu!

Grizkoloraj lingvokodoj signifas, ke la paĝaro en tiun lingvon ne estas plene tradukita aŭ la traduko ne estas ĝisdata.

ar - عربي	fa - فارسی	lt - Lietuvių	zh-cn - 简体中文
bg - Български	fi - Suomi	nl - Nederlands	zh-tw - 正體中文
ca - Català	fr - Français	no - Norsk	
cs - Čeština	he - תעודת	pl - Polski	
da - Dansk	hr - Hrvatski	pt - Português	
de - Deutsch	hsb - Hornjoserbsce	ru - Русский	
el - Ελληνικά	hu - Magyar	sk - Slovenčina	
en - English	it - Italiano	sl - Slovensko	
eo - Esperanto	ja - 日本語	sv - Svenska	
es - Español	ko - 한국어	vi - Việt nam	

Bildo 3. La lingva bunto de lernu.net

La kurso *Babili esperante* aperas en formo de interreta magazino por infanoj kiuj deziras lerni kaj ludi per Esperanto (bildo 4). Ĝi aperas proksimume ĉiun trian monaton. Ĝis nun aperis kvin numeroj kun fiksjaj kaj movaj bildoj, sonoj, rakontoj, ludoj...


Pupulina kaj la tri ursoj (Pupulina 与三只熊)

Pupulina iras al la arbaro.
(Pupulina 到树林里)

🔊 🔊

Post iom da tempo, ŝi estas laca. Ŝi deziras ripozi.
(过了一些时候, 她累了. 她想要休息.)

🔊 🔊



Bildo 4. El leciono por ĉinaj infanoj

Iom pli specifa estas la kurso *La puzlo Esperanto*, kiu ekzercigas pri vortfarado kaj frazkonstruo utiligante la trajton de Esperanto, ke ĝiaj morfemoj kunmetiĝas en novajn vortojn sen morfologiaj aŭ fonetikaj ŝanĝoj. Alimaniere gramatikumas la meznivela kurso *Verbumado*. Ĝi traktas la verboformojn kaj, speciale,

la problemon de transitiveco kaj uzadon de la sufiksoj ig kaj iĝ, kun multaj trafaj ekzemploj kaj ekzercoj. Alia meznivela kurso, *Jen nia IJK*, instigas al plia lernado kaj praktika uzado de la vivanta Esperanto (bildo 5). Ĝi renkontigas la lernanton kun okazaĵoj kaj etoso de unu el famaj Esperanto-kulturaj tradiciaĵoj – Internacia Junulara Kongreso. Tio povas vekti plusan entuziasmon pri la lingvo kaj movado. Al pli bunta aro da renkontiĝoj kun Esperanto-kulturaj eventoj kaj verkoj kondukas la *Vojaĝo en Esperanto-lando*.

Paralele kun la kursmaterialoj, *lernu-uzantoj* havas je dispono elektronikajn testojn kaj ekzamenojn, retan vortaron, diversnivelaĵajn gramatikojn, virtualan bibliotekon kun ekzemploj el la originala kaj traduka literaturo de Esperanto, ekzemplaj artikoloj el E-gazetoj, tekstoj pri la lingvo historio kaj movado, kolekto de Esperanto-muziko, filmoj, ŝercoj kaj la *Zamenhofa proverbaro*.

Komunikfaciligoj de *lernu.net* (mesaĝsistemo, forumoj, bildkarto, virtuala klasĉambro, tujmesaĝilo) ebligas pluan praktikadon de la lingvo per interŝanĝo kaj diskutoj kun aliaj *lernu*-membroj. Tiel la kursanoj fariĝas aktivaj uzantoj de la lingvo kaj efektivaj membroj de la Esperanto-komunumo.

Jen nia IJK
[Enkonduko | Antaŭscioj | Superrigardo | Elŝuti]

Ĉapitro 6.1 - Alveno kaj akceptiĝo

Ina kaj Kabe alvenas post sukcesa vojaĝo kaj uzado de Pasporta Servo en du urboj

Kabe: Jen, vidu, tie estas granda Esperanto-flago.

Ina: Jes, kaj sub ĝi estas ŝildo kun la teksto "Bonvenon al IJK!". Hu ra! Ni do finfine alvenis.

Kabe: Jes... Mi estas tre laca kaj malsata... Ĉu vi pensas ke ni povas tuj ion manĝi?

Ina: Mi dubas pri tio... Unue ni devas akceptiĝi ĉe la akceptejo, kaj tio povas daŭri longe miasperte.

Kabe: Ho ve! Ĉu tio estas la vico por la akceptejo?

Ina: Mi timas ke jes. Ne estas tute perfekte alveni vespere... Sed ni povas babili kun homoj en la vico. Jen, mi vidas amikon de Rusio! Saluton Katja!

Kabe: Mi estas malsata, mi volas manĝi.

Aŭskulti la sonon per la son-ludigilo.



Bildo 5. Leciono el meznivela kurso

La retkomunumo de lernu!

Fakte, *lernu.net* estas pli ol kursaro kaj retlernejo de Esperanto. Ĝi estas siaspeca retkomunumo de kreantoj kaj uzantoj de ĉi tiu enorme sukcesinta projekto. Ĝia kerno estas deko da *lernu*-teamanoj, loĝantaj dise tra la mondo, kiuj prizorgas la teknikajn kaj enhavajn aspektojn de la retpaĝaro, pluevoluigas ĝin kaj kunordigas funkciadon de la *lernu*-komunumo. Esencaj por la funkciado estas kelkaj dekoj da *lernu*-helpantoj. Ili estas surterenaj agantoj kiuj helpas diversmaniere: tradukas la paĝaron al diversaj lingvoj, lingve helpas la uzantojn kaj kontrolas iliajn hejmtaskojn, plibonigas la retvortarojn de *lernu.net*, kontribuas enavon, testas, komentas, programas kaj alimaniere subtenas la kvantan kaj kvalitan kreskon de la projekto. La rezulto estas daŭra plimultiĝo de novaj aliĝoj al *lernu.net* kaj de novaj esperantistoj kiujn ĝi kreis.

La projekto ***lernu!*** estis oficiale lanĉita la 21-an de decembro 2002 kaj ĝis la fino de la jaro havis 185 registriĝojn de ĝiaj uzantoj. En la jaro 2003 aliĝis novaj 3.684 uzantoj, poste 6.505 en 2004, kaj ĉiujare la nombro de novaliĝintoj kreskis ĝis 15.887 en la jaro 2007 kaj 4.876 en la unuaj tri monatoj de 2008. La *lernu*-komunumo fine de marto 2008 atingis la membronombron de 48.655 registritoj, multe pli ol la membraro de la plej granda esperantista organizaĵo UEA.

Plej multaj uzantoj de *lernu!*, proksimume 13.000, uzas la paĝaron anglalingve, sekvas la hispana kun 4.650 uzantoj, portugala 4.250, Esperanto 3.400, franca 3.300 ktp. Plejmulto loĝas en Usono, proksimume 6.570 uzantoj. Sekvas Brazilo kun 4.280 *lernu*-uzantoj, Germanio 2560, Francio 2.300, Hungario 2.160 ktp.

Kaj en Serbio?

En Serbio estas nur 63 registritaj *lernu*-uzantoj, kvankam la ĉefrespondeculo kaj kunordiganto de la projekto estas 25-jara ser-

bino, nun loĝanta en Svedio kun edzo esperantisto kaj trijara filino – denaska esperantistino. Fakte, tio estas nur unu el simptomoj de la longdaŭra malkresko de la movado en Serbio.

Kion fari? Ĉu *lernu.net* povas helpi disvastigadon de Esperanto en Serbio kaj revigligon de la Serbia Esperanto-movado? Sendube jes. La hungarlingva *lernu.net* jam funkcias kaj uzeblas por hungarlingvanoj en Serbio. Ankaŭ la anglalingva versio uzeblas ĉi tie konsiderante la vastan lernadon kaj uzadon de la angla. Tamen, por plena utiligo de *lernu.net* en Serbio necesas:

Traduki la retpaĝaron en la serban kaj, laŭeble, aliajn lingvojn uzatajn en Serbio. Kiel? Se vi ne jam registriĝis al *lernu.net*, vi povas fari tion sekvante la ligilon Mi volas registriĝi supre dekstre sur la retpaĝo www.lernu.net. Poste, se vi pretas esti tradukanto de *lernu.net*, vi povas trovi ĉe <http://vikio.lernu.net/Helpado/Tradukado/PorTradukantoj> instrukciojn pri kiel eniri kaj uzi la traduksite-mon de *lernu.net*.

Havi lingvohelpantojn por la serba kaj aliaj lingvoj en Serbio, kies rolo estas helpi la lernantojn de Esperanto, korekti iliajn hejmtaskojn kaj alimaniere subteni la projekton. Se vi pretas por tiu rolo, legu la klarigojn ĉe http://eo.lernu.net/pri_lernu/subteno/praktike.php, aŭ turnu vin al teamo@lernu.net.

Popularigi la lernadon de Esperanto per *lernu.net* inter lernantoj, studentoj kaj aliaj civitanoj. Kiel? Tio povas esti bona tasko por la Serbia Esperanto-Ligo, Esperanto-Instituto Beograd kaj Esperanto-societoj.

Konklude

La tradiciaj kursoj de Esperanto en klubejoj kaj lernejoj jam longe ne donas imponajn rezultojn en Serbio kaj la movado malkreskas. Tio ne signifas, ke la Esperanto-kursoj kiel laborformo estu forlasitaj. Tamen tio indikas, ke novaj agadmanieroj estas be-

zonataj por adaptiĝi al la rapide ŝanĝiĝanta mondo. La eksploda evoluo de la komunikteknologio montras la direkton kaj donas la rimedojn. La perkomputila lingvolernado, komplemente al la tradiciaj ĉeestaj kaj koresondaj kursoj, vaste en la mondo jam montriĝis efika maniero por pli intensa disvastigado de Esperanto, precipe inter la junularo. Tio eblas sed ankoraŭ ne okazas en Serbio.

Ne estis celo de ĉi tiu artikolo analizi ĉiujn disponeblajn retkursojn nek kompari ilin kun la tradiciaj formoj de Esperanto-instruado, nek avantaĝigi unu aŭ alian. La celo estas instigi al utiligado de unu el la plej efikaj kaj sukcesantaj retlernejoj kaj retkomunumoj de Esperanto – www.lernu.net – kontribue al revigligo de la Esperanto-movado en Serbio. La lernejoj estas dezirindaj partneroj por tiucela laboro de esperantistaj organizaĵoj. Kvankam esperanto ne estas oficiale prezentita en la lernejaj programoj, eksterprogramaj aktivajoj surbaze de esperanto povas esti akceptitaj kun intereso. Tion konfirmas, interalie, la tutpaĝa populara artikolo pri Esperanto kaj ĝiaj pedagogiaj valoroj aperinta pasintjare en la lasta novembro numero de *Kleriga revuo (Prosvetni pregled)*, organo de la pedagogoj de Serbio.